

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161

Cena – dobrovolný příspěvek

Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. kultury 47/87-403/16

Numero 4

Oktoebro 1990 Říjen

Číslo 4

xx

PACAJ AFORISMOJ (DAŬRIGO):

Neniam estis bona milito kaj malbona paco. - Justeco estas same necesa inter najbaraj nacioj kiel inter najbaraj civitanoj. - La rabisto estas la sama rabisto, aŭ li rabas grupe, aŭ li rabas sole. Kaj la nacio, kiu gvidas maljustan militon estas nur granda rabistaro. - La duonvero estas ofte granda mensogo. Franklin

Necesas al la vivo pli donaci ol ĝin rapidigi. Ghandí.

Fundamenta devas esti ta leĝo, per kiu ĉiuj interŝtataj malpacoj estas solvataj per internacia kongreso. Tiamaniere estos la milito – tiu ĉi honto kaj punilo de homaro poreterne forigita. Garibaldi.

Militarismo estas la plej granda tirano de nia epoko. Gladstone.

Konkluda saĝeco estas tia: Nur tiam vi meritas liberecon kaj vivon, se vi ili ĉiutage batalas. - Ne sufiĉas nur scii, oni devas ankaŭ la spertojn uzi. - Ne sufiĉas voli - ni devas ankaŭ agi. Goethe.

MÍROVÉ AFORISMY (POKRAĈOVÁNÍ):

Nikdy nebyla dobrá válka ani špatný mír. - Spravedlnosti je stejně potřeba mezi sousedními národy, jako mezi sousedními občany. - Loupežník stejným lupičem, když loupí sám. A národ, který vede nespravedlivou válku je jen velkou bandou. - Polovina pravdy je často jen velkou lží. Franklin.

Je třeba více životu dávat, než ho urychlovat. Ghandí.

Základem musí být zákon, jímž všechny spory mezinárodní řeší se na mezinárodním kongresu. Tímto způsobem bude válka – tato metla a potupa lidstva navždy odstraněna. Garibaldi.

Militarismus je největší tyran naší doby. Gladstone.

Poslední závěr moudrosti je ten: jen pak jsi hoden svobody ažití, když rveš se o ně den co den. - Nestačí vědět, musíme také vědění užívat.

- Nestačí chtít, musíme také jednat. Goethe.

75-a Universala Kongreso de E-o Havano 14-21 julio 1990: Ĝi okazis kun partopreno de 1617 homoj, aliĝintaj el 54 landoj sub auspicio de la vicprezidanto de Kubo C.R.Rodriguez, kiu dum la inaŭguro festparolis. Tiam aperis sur la tribuno ankaŭ Fidel Castro, tute neanoncite, embarasante la estraranojn. Ĵaŭde Castro invitis ducenton da kongresanoj al akcepto en la Revolucia Palaco. Tie la manpremis preskaŭ ĉiun unuopa akompanante la saluton per kelkaj vortoj. Li prezentis sin favora al Eo. En la parolado li diris, ke la E-o movado venkos, „ĉar la ideo estas justa“. Li memorigis kongresanojn, ke la unuaj kristanoj estis malmultaj kaj ke ili estis ankaŭ krucumataj aŭ ĵetataj al leonoj. „Mi ne deziras, ke vi estu krucumataj eĉ ĵetataj al la leonoj“ li diris kaj admonis kongresanojn persisti. Adiŭante li diris al UEA-prezidanto D-ro Wells „Konsideru min soldato de E-o!“ Klerigan eron konsistigis la Internacia Kongresa Universitato. Ĉi jare okazis 11 prelegoj: pluraj pri latinamerika literaturo kaj lingvaĵo, sed ankaŭ pri temoj ekonomiaj, medicinaj kaj ĥemiaj. Novaĵo du ĉi tiu kongreso estis prezentado ankaŭ al neesperantista publiko, ĉu en la Akademio de Scienco, ĉu en la Universitato de Havano. Prezentado de la kongreslando okazis ĉijare per tri informaj prelegoj. Aliaj klerigaj eroj estis „la tagoj“: la tago de la lernejo kaj la tago de la paco. Aldoniĝis ĉi-jare la tago de la libro, kiun oni intencas tradiciigi. La ĉi-jara kongresa temo estis „E-o, evoluo kaj kultura diverseco“, al kiu estis dediĉitaj kelkaj apartaj kunvenoj, unu simpozio kaj unu ĝeneralala kunveno de UEA. La alia ĝeneralala kunveno de UEA kiel kutime okupiĝis pri la estrara raporto. La komitato akceptis la aligon de du aliaj landaj asocioj, nome la estona kaj la ukraina, kaj de unu plia faka asocio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

75. Universální kongres Esperanta Havano 14-21.července 1990: Měl 1617 přihlášených přítomných z 54 zemí, protektorování viceprezidentem Kuby C.R.Rodriguezem, který pronesl slavnostní řeč při zahájení. Tehdy se objevil nečekaně na tribuně Fidel Castro a uvedl předsednictvo do rozpaků. Ve čtvrtek pozval Castro dvě stovky kongresových členů k recepci v Paláci Revoluce. Tam téměř každému jednotlivě stiskl ruku provázeje pozdrav několika slovy. V projevu řekl, že E-o zvítězí a projevil se příznivě k E-u, „protože idea je spravedlivá“. Upamatoval shromáždění, že prvních křesťanů bylo málo a že byli ukřižováni nebo házeni lvům.“ Nepřeji si, abyste byli křižováni nebo házeni lvům,“ řekla a vybízela účastníky kongresu k vytrvalosti. Při rozloučení řekl UEA-předsedovi Dr Wellsovi „považujte mne za vojáka Esperanta.“ - Vzdělávací část tvořila Mezinárodní Kongresová Universita. Letos se uskutečnilo 11 přednášek: vícere o latinsko-americké literatuře a jazykové problematice, ale také na témata ekonomická, lékařská a chemická. Novinkou tohoto kongresu předvedení také neesperantské veřejnosti ať v Akademii Věd nebo na havanské universitě. Kongresová země se letos představila třemi informativními přednáškami. Jinými vzdělávacími částmi byly „Dny“: den školy a den míru. Letos se přidal den knihy, který chtějí učinit tradičním. Letošní kongresové téma bylo „E-o, vývoj a kulturní různost“, kterému bylo věnováno několik zvláštních schůzí, jedno sympozium a jedna všeobecná schůze UEA (valné shromáždění). Jiné valné shromáždění UEA se jako obvykle zabývalo zprávou vedení. Výbor schválil připojení dalších dvou národních svazů, totiž estonského a ukrajinského a jednoho dalšího odborného svazu, Mezinárodního svazu (ligy) učitelů esperanta (ILEI).

Kulturaj aranĝoj estis multaj. Krom la klasika koncerto okazis la tradicia vespero, kiu estis tute kuba kaj prezentis kalejdoskopon de la kuba kulturo multfonta; domaĝe nur, ke la kunliga kaj klariga parolo estis hispanlingva. Teatraĵoj kompreneble ne mankis kaj estis jam tradicio, ke Bulgara Eperanto-Teatro prezentas spektaklon dum la UK-oj. Temis ĉifoje pri la itala komedio „Mi ne plu konas vin“. La kuba aktorino Georgino Alma prezentis la kuban monologon „Eksterordinaraj deklaroj de Rosa Penderton“. Jugoslavo prezentis krom alia ankaŭ recitalon de E-tradukoj de poemoj de la fama kuba poeto Nikola Guillen. En la Belartaj konkursoj la grandan plimulton de premioj gajnis Georgo Camacho el Hispanio. La infanlibro de la jaro fariĝis „Pippi ŝtrumpolonga“ de Astrid Lindgren. - Aliaj distraĵoj estis la bankedo, la balo kaj la tuttagaj ekskursoj. Neniaj antaŭe okazis maratona kuro dum UK, sed ĉijare okazis mallongigita, ĉar nur trikilometra maratono. Inter la trideko da partoprenantoj estis la fama kuba sportisto kaj la UEA prezidanto. Tiun lastan sponsoris grupo da kongresanoj per promeso kontribui al la kongresa kaso „tria mondo“, se li entute finos la kuron. Efektive li trakuris la distancon en 17 minutoj kaj 22 sekundoj. Dum la lastaj kongresoj funkciis ĉiam ia kongresa gazeto. La ĉi-jara nomiĝis „La Havana Kuriero“ kaj aperis en 6 numeroj. (laŭ Prytz+Malínská).

Kulturních pořadů bylo mnoho. Mimo klasického koncertu se uskutečnil tradiční národní večer, který byl zcela v kubánském provedení a představil kaleidoskop mnohoprarmenné kultury; škoda jen, že spojující a vysvětlující projev byl španělský. Divadelní hry pochopitelně nechyběly a je již tradicí, že bulharské esperantské divadlo představuje podívanou během kongresů. Tentokrát šlo o italskou komedii „Více vás neznám“. Kubánská herečka Georgina Almanza předvedla kubánský monolog „Neobyčejné prohlášení Rozy Pendertonové“. Jugoslávci vystoupili mimo jiné také recitálem e-překladů básní proslulého kubánského básníka Nikolase Guillena. V uměleckých soutěžích získal větší část premií Georgo Camache ze Španělska. Dětskou knihou roku se stala „Pippi štrumpolonga“ autorky Astrid Lindgrenové. - Jiné kratochvilné části byly banket, ples a celodenní výlety. Nikdy předtím se neuskutečnil maratonský běh během kongresu, ale letos se uskutečnil zkrácený, jen tříkilometrový maratón. Mezi třicítkou účastníků byl jak známý kubánský sportovec, tak i prezident UEA. Tohoto sponzorovala skupina členů kongresu slibem přispět do kongresové pokladny „třetí svět“ jestliže vůbec běh dokončí. Ve skutečnosti uběhl vzdálenost za 17 minut a 22 vteřin. Během posledních kongresů fungoval vždy nějaký kongresový časopis. Ten letošní se jmenoval „Havana kuriero“ a vyšlo 6 čísel. (Podle Prytze-Malínské).

Centjariĝo de Esperanto en niaj landoj. Poŝtoficejo Strážnice uzadis dum tagoj 20.8.-19.9.1990 por/okazan (příležitostné) esperantan afrank/maŝin/stampilon (strojní razítko) kun la ĉeĥa teksto: 100 let první české učebnice esperanta F.V.Lorenc. „La unuan ĉeĥan E-lernolibron aperigis la aŭtoro František Vladimír Lorenc propra/koste (na vlastní náklad) ĉe presisto F.Hoblík en Pardubice en 1890, tri jarojn post apero de la unua E-lernolibro de D-ro L.L.Zamenhof (julie 1887 en Varsovio). F.V.Lorenc naskiĝis la 24.12.1872. Esperanton li lernis jam en la jaro 1887. En jaro 1893 li fuĝis (uprchl) antaŭ la aŭstra polico en Brazilo. Li estis poligloto kaj konis pli ol 80 lingvojn. Li estas aŭtoro de 68 verkoj, el kiuj 56 aperis libroforme. En la jaro 1903 oni nomumis (jmenovali) lin ŝtata instruisto en Brazilo. Li mortis kiel grand/aĝulo (stařec) en la jaro 1957 en vilaĝo Dom Feliciano en la ŝtato Rio Grande do Sul en Brazilo. Pri eldono de nia poŝta stampilo meritis Vl.Hasala el Strážnice, kiu liveros informojn.

Ĉu aktuala? Pripensu:

Multo ŝanĝiĝis, sed homoj restas samaj. Tamen ni scias hodiaŭ, kiu estas kiu. Kiu estis honesta, estas honesta ĉiam. Kiu estis fidela, estas fidela ankaŭ nun. Kiu turnas sin kun la vento, tiu turnadis sin jam pli frue. Kiu pensas, ke nun venis lia ŝanco, pensis ĉiam nur pri si. Kiu ŝanĝis fidon, neniam havis iun. Kiu malamis, havis malamon en si ĉiam. Kiu volis bonon, denove bonon volos.

Karel Čapek

Je to aktuální? Zamysli se:

Mnoho se změnilo, ale lidé zůstávají stejní. Jenže teď víme, kdo je kdo. Kdo byl slušný, byl slušný vždycky. Kdo byl věrný, je věrný i teď. Kdo se točí s větrem, točil se i dřív. Kdo myslí, že teď přišla jeho chvíle, myslel vždy jen na sebe. Kdo mění víru, neměl žádnou. Kdo nenáviděl, měl tu nenávisť vždy. Kdo chtěl dobré, bude zase chtít dobré.

Karel Čapek

Helpu krei aktualajn terminojn – alplenigu, diskutu!

sponsor – sponsoro, patrono, garantiulo, mecenato

tržní mechanismus – libera merkato

disident – disidento, disopinianto (rozkolník, odstěhovanec, odpadlík) misiranto, misideano, forfalanto, defalanto, miskredanto

televizní klip -televida klipo, tranĉero, tranĉaĵo

konsensus – (soulad) harmonio

vágní – necerta, neklara, nebula

smysluplný – sencoriĉa, sencoplana

rozporuplný – disharmonia, disharmonioplana, malkonsentoplana, malakord(em)a, malakordoplen, skism(et)a, misharmonia (PIV)

zpochybňovat – dubindigi (x dubigi=igi iun dubi). Pridubebli aserto.

letenská pláň – plataĵo (Hromada de Letná), homkolekta platareo.

(pliparton da terminoj proponis J. Mařík)

Atentigo de J. Mařík: korektu en la vortaro de Hromada: kompost=kompoŝto (laŭ PIV). mulĉo = nastýlka!

La gazeto TVORBA n-ro 34/90 sur paĝo 10 aperigis propagandan artikolon pri E-o de s-ano Jiří Rada, Rybalkova 1029, bl.645-A, 43400 Most

LANĈOV 1990 havis rekordan partoprenon de 3 skipoj po 160 partoprenantinoj, precipe junularo. Kvankam la financa efiko ne estis favora pro malaltigita prezo por infanoj, la sukceso en periodo, kiam superas ĉie intereso por la moda angla lingvo, estas granda dank` al oferemo de la organizantoj el la klubo Třebíč.

La VIa kongreso de ĈEA en Třebíč ŝanĝas pro termino de komunalaj balotoj al sekvanta semajnfino 30.XI.-2.XII.90. Estos elektita la nova komitato. Kunvenos senpage delegitoj de ĉiuj e-kluboj. Ĉiu esperantisto povas partopreni en la kongreso sen balotrajto je modera prezo. Aliĝu al tiu grava e-a renkontiĝo ĉe la vicprezidantino de nia asocio Věra Podhradská, Poříčí 1, 60300 Brno, kvankam la termino jam pasis.

Monda kongreso de esp.fervojistoj IFEF 1990 devas pro nuligo de litmendo ĉe ĈKM en Brno (samtempa neatendita aranĝo de ekspozicio en Brno). La kongreso okazos tamen aliloke en la sama termino (versimile en Olomouc), ĉar la terminon oni na plu povas ŝanĝi.

Landa konferenco de la fervojista sekcio okazis 28.-30.IX.90 en Staré Splavy en bela aŭtuna naturo ĉe Máchovo jezero. La amika atmosfero renovigis spiriton de iamaj someraj tendaroj en Doksy. Ĉeestis tiama meritplena organizanto Václav Špůr el Doksy.

Famo pri

Morto de Karolo Piĉ, nia akademiano – disvastiĝis interesperantistoj de ni ŝtato. La eventon (událost) sprite komentis Budapeŝta Informilo: LA GRANDA MISTIFIKO: Onidire (prý) la plej grandaj homoj estas tiuj, kies morto estas dis/fam/ig/ita jam dum ilia vivo. Tiel okazis pri Mark Twain, pri Zamenhof, kaj nun ... pri Karolo Piĉ. Jam du la Roterdama Uko cirkulis la klaĉo (kleveta), ke la aŭtoro de „Klaĉejo“ ekloĝis en „La litomiŝla tombejo „ (nomo de du famaj verkoj de KP). Nun tamen evidentiĝis, ke la „Mortsonorilo de Chambley“ (plu verko) ne sonis por li ... Mal/pez/iĝis (ulevilo) la koro de la redaktoro: ne necesas nekrologo ... kaj samtempe li eble iom sub/rid/et/as (=kaŝe ridas) pri la kolegoj, kiuj tro frue kredis la sciigon. Povas esti, ke nun funge (jako houbý) elkreskos funebraĵoj pri li, eblas, ke tiuj, kiuj hieraŭ anatemis (dávali do klatby) liajn lingvajn ekscesojn, retrospektive ek/laŭdos lin; aliaj eble komencus kulte kultivi lin, se la demento ne tuj sekvus la pseŭdan mortanoncon ... Se ni ne scius el niaj strikte privataj fontoj, ke la miskomprenon kaŭzis simple lia edziĝo (nekredeble! ĉu tiu mizogino /viro, kiu malamas virinojn/ povas eĉ edziĝi?) pro kio li adoptis la nomon de sia edzino, kaj tiel li „mortis“ en civila vivo kiel Piĉ, mi emus pensi, ke li mem reĝisoris tiu ĉi tragikomedieton. Ja (vždyť) kiu ne ŝatus legi la proprajn nekrologojn? Eble li, kiu verkis ne nur tri romanojn kaj – laŭ/klaĉe – neeldonitajn eseojn kaj teatraĵojn, sed ankaŭ poemojn bone konsciis (si uvědomoval) la tristan sorton dumvivan de ĉiuj poetoj, pri kiuj Heinz Kahlaŭ jene poemas: „LA MORTO DE LA POETO. /Nun morti li./Nun povas ni demandi, nun tempas ni (je nám na čase) por aŭdi la respondon./Nun scias ni: li diris tion al ni./Nun,se li vokus, pretus jam la mondo.“ Kiu kredos nun la duan morton de Karolo Piĉ? István Ertl.

„Raportaĵo sur la insulo“ – estas la titolo de la ampleksa fantazia artikolo en EXPRES, ĵurnalo en Prago 17.VIII.90, kiu temas pri subakviĝo de la luksa ŝipo „Titanic“ en la jaro 1912, dum kiu onidire – laŭ fikcio – saviĝis parto da pasaĝeroj kaj hejmiĝis sur deserta insulo, kie ili kreis etan ŝtaton. Pro lingva barilo ili elektis unuecan lingvon E-o. La aŭtoro (marko:ve) tre sprite bildigas la fantaziaĵon kaj diversloke uzas en la teksto esperantajn vortojn, tiel ke la leganto neperforte interkonatiĝas kun kelkaj esperantaj vortoj, kiuj montras facilecon de nia lingvo. La artikolo montras spritan, neperfortan propagandon, kiu certe estas sekvinda.

Finstudintoj de la koresponda kurso:

Jančíková Marie
Tychtlová Jana
Novotná Marie
Šolta Jaromír
Pachner Josef
Dosedělová Pavlína
Tumpachová Marie
Vavrušová Dagmar
Lysenková Eva

Espereble (doufejmež; snad) la novaj gesamideanoj, al kiuj ni kore gratulas trovos vojon por sia aktiveco en lokaj esperantaj kluboj! Helpu ilin kaj lingve kaj en ilia aktiveco!

Nikolao-vespero en Jablonec nN okazos jam tradicie sabate (8.XII.90) je la 19a horo en malgranda salono de KaSS Jbc, Jiráskova 7. Internacia partopreno, danco, amuzo, tombolo. Tranokto ebla en turisma tranoktejo. Aliĝu ĉe ESPERANTO, pošt.přihr.190, 46621 Jablonec nN.

Alvoko el Borotice (distrikto Příbram): Lernantoj, instruistoj kaj amikoj de lernejo en vilaĝo Borotice, sude de Prago, strebas (snaži se) protekti naturon en sia ĉirkaŭaĵo kaj tiucele (s cílem) ankaŭ konatigi kun aliaj protektantoj (ochránci) de naturo en najbaraj landoj. Per reciproka konatiĝo ni povas pli bone kompreni la kondiĉojn kaj la bezonojn de la VERDA PACO (Greenpeace) de la Tero. Niaj lernantoj de la 7a kaj 8a klasoj proponas senpagan restadon en majo kaj junio 1991 en somerkabanoj ĉe la valbaraĵa (Slapy) lago por lernantoj, kiuj ebligos konatigi ilin same kun la protektado de la naturo en ilia medio. Bonvolu skribi al Karel Kraft, Županovice 49, 26215 Borotice, CS.

Universlala Kongreso 1992 – UEA akceptis en Havano proponon de nia ĈEA organizi la mondan kongreson 92 en Prago, kondiĉe de financo protektado nia ŝtato. La alta protektado estas pritraktata kun prez. Havel aŭ Věra Čáslavská (laŭ la kastela propono) aŭ Alexandr Dubček (li en infanaĝo vivis kun sia patro en la socio Interhelpo, Frunze, uzanta interalie ankaŭ Esperanton.

STARTO ĉijare finas sian eldonadon. Laŭ interkonsento kun slovaka EA kun ĈEA ek de la 1-a januaro estos eldonita kuna gazeto PERSPEKTIVO, kiu strebas esti mezeŭropa gazeto. Redaktoro PhDr Stanislav Košecký Csc, 81400 Bratislava Rača, Skrabinská 1/A. Nian gratulon! Espereble la gazeto aperados regule je kontento de anoj kaj de ĈEA kaj de SEA.

Renkontiĝo en Ercmontaro (Rudohoří) ITREE 7.-11.V.90 sukcesis kun 64 partoprenantoj el 6 landoj ĉijare en germana urbo Schwarzenberg (iama GDR) per riĉa turismo kaj kultura programo. Ĝi havas jam sian 10 jaran tradicion. Estis interkonsentita dum oktobro 1990 starigi kontrakton por pluaj 5 jaroj de amika kunlaboro inter la klubo en Karlovy Vary kaj Schwarzenberg en novaj ekonomiaj rilatoj.

Post perfota likvido de sekcio de KELI (Kristano esperantista ligo internacia) ĝi refondiĝis la 3an de junio 90. La labortasko restas ideo de kunlaboro kaj frateco inter nacioj en spirito de kristana amo, disvastigo de E-o inter kristanoj kaj helpo al blinduloj de la Tria Mondo. Aliĝu de Jar. Šperling, 18000 Praha 8, Heydukova 11, kiu sendos informojn kaj gazetojn KELI kaj Dia Regno.

CIRKULERO estas nova belega bulteno de la junulara sekcio de ĈEA kun freŝaj informoj el junulara mondo, anoncoj de renkontiĝoj, adresoj ktp – lingve elstara, eĉ en eksterlando favore komentariita. Nepre (urĉitĉe, bezodkladnĉe) aliĝu ĉe la junulara sekcio ĈEA, petu cirkuleron.

KRITIKO: „Preskaŭ samtempe reaktivis sekcio de katolikaj esp-istoj kaj KELI. Spite, ke ambaŭ sekcioj havas la saman celon kaj spite proponoj pri unueca sekcio – la unuiĝo ne realiĝis. Estas dolore, ke ni prezentiĝas kiel kristanoj.esp-istoj, manifestantaj eblecon de interkompreniĝo per sola internacia lingvo en unuiĝonta Eŭropo, en unuiĝonta mondo.“ Václav Pospíšil, Železný Brod.

Ĉu Gagarin estis la unua? La 29an de aŭgusto kunvokis populara hungara publicisto kaj aŭtoro de multaj originalaj esperantaj detektivromanoj István Nemere preskonferencon okaze eldono de la libro „G.=kosma mensogo (leĝ)“ asertante (ujiŝt’ujíc), ke G. dum sia preskonferenco legis raporton el mispreparita papero kaj dokumentis sian flugon eĉ ne per unu fotoĵo, ĉar oni forgesis al li kunpaki fotoaparaton. Laŭ N. Nevera ŝajnas ankaŭ esti priskribo de la belaĵoj de Sudameriko de G. ĉar dum transflugo tiam regis profunda nokto. La gloron de G. dubindigis ankaŭ moskva esperantisto Dro Medvedev, gasto de la kunveno de praga klubo la 1-an de oktobron menciante famon, ke G. mortis nur estintjare en psikiatria sanatorio. Laŭ Svob. Slovo 30.VIII.90

Jubileo de Zdeněk Řezáč. La 9an de septembro li fariĝis 70 jarulo! Li multe meritis (zasloužil se) pri disvastigo de E-o precipe pedagogie. Dum dek jaroj li sisteme okupiĝas per gvido de traduka kurso, kiu kontribuis forte al plibonigo de la lingvaj scioj de liaj lernantoj. Nur en sezono 89/90 tradukadis entute 31 personoj en 4 grupoj (Plej sukcesis en unuopaj grupoj L.Šebková el Nová Včelnice, L.Macháčková Prago, Květa Hubnová el Prago, inter elito Václav Stibůrek Benešov u Pr). Li akceptu nian koran gratulon kaj deziron de multaj pluaj jaroj kaj fekunda (plodné) laboro! (Adreso Z.Ř. Vítězná 355, 46841 Tanvald).

LENTAIGNE: KIEL DIRI? Konversaciaj terminoj edukas al internacia pensmaniero. Daŭrigo de la temo Justico-Krimo: Verdikti. Apelacii (odvolat se). Justa (spravedlivý) aŭ partia (straníci) juĝisto. Juĝisto celanta justecon, akcelanta la veron. Juĝi objektivite. Korupti juĝiston. Aĉetebla juĝisto. Talaro. Juĝisto devas havi du orelojn. Subaĉetinta, fripona (darebácký) atestanto. Pri propra afero neniu juĝas libere. Vi ne povas esti samtempe juĝanto kaj juĝato. Juro (právo). Juraj aferoj. Formulo de juro. Paciga juĝisto. Enketa (vyšetř.) juĝisto. Tribunalo de la unua instanco. Civila jurisdikcio (rajto juri). Kasacia (nuliga) kortumo. Apelacia kortumo. Alta kortumo. - KRIMO: Oni trovis iun kun tranĉita gorĝo. Enpiki ponardon (dýku) en ies bruston. Identigi la kadavron (mrtvolu). Krimo de pasio. La pasio kondukas al krimoj. Mistera (tajemný) krimo. La okazejo de la murdo (místo vraždy). Distingi (rozlišit) inter okaza mortigo kaj intenca murdo. Antaŭpensita (předem promyšlena) krimo. La intenco „konsituas“ la krimon. Malaperi komplete sen lasi spurojn (stopy). Anonci premion, prezon por la kapo de krimulo. Riĉa kompenco (odměna) La polico rastis (rasto = hrábě) la kvartalon. Aresti (zatknout) suspektaton. Liaj manoj estas puraj de tiu afero. Teksi, streĉi reton kontraŭ iu. Lasi sin entiri (zatáhnou) en reton. Fali en kaptilon (past). Kaptito laŭ parolo (na udání).

Francaj „Verduloj“ akceptis kiel unua kaj la plej grava lingvo por internaciaj kontaktoj – Esperanton!

Francouzská strana zelených přijala jako první a nejdůležitější jazyk – Esperanto!

Adreso: S-ro Emile Mas, 38, rue de Jean Moulin, F-33220 Saite Foy la Grande, Francio a' Eŭropaj verduloj, Eŭropa parlamento, Selliard str 97-113, B 1040 Bruselo.

Korespondi deziras:(mallongiloj: bk=bildkartoj; ĉl=ĉiulande; ĉt=ĉiuteme; d=deziras; iŝ=interŝanĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko;; pm=poŝtmarkoj; s-ro=sinjoro; tm=tutmonde).

Koresponda servo ILEF, Jean Demissĝ.18, rue de Lieutenant Boursuisnon, F-55600 Montmedy, Francio.

Kultura kooperativo de Esperanto, Bv.Treze de Maio 47, Sobreloja 2089, BR-20031 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Malgranda E-klubo, div.aĝoj, d kor tm ĉt itŝ de urboj pejzaĝoj, CEK, c/o V.Drasiq, Box 229, Corrimal, N.S.W., 2518 Aŭstralio.

Emeritaj geedzoj d kor + gastigadi reciproke. Emi kaj Misi. Emilia Puskas, str. Jabacarilo 3, R.3400 Clu, Romano

Hogatollah Hemati, Dolatabad-Grune 3.blok 2,nro 10, TEHERAN 18566-Iran d, k

Aŭstria koresponda esperantista servo Alex Leitner, Metznergasse 29/19A 1140 Wien, A

Romana Morelli, 47j, Via Cantore 8, 20052 Monza (Mi) Italio, pri ĉt tm

E-kursanoj 13-16j d kor tm kluboj. E-klubo, ul 60let Oktibra 6-135 SU-626440 Niĵnevartovsk, Sovetunio

René Scholz, Am.Luthersbrunnen 333, GDR 4600 Wittenberg. Lutherstadt 18j junulo d kor pri m, literaturo, scienco, filmoj.

Kašparec Jaroslav, 13000 Praha 3, Vlčkova 30, disvendas eperantaĵojn.

Petrov Alfredo, Casilla 1728 Cochabamba, Bolivio dez. k pri mineralogio.
Manučehr Zejnali, P.O.Bow 336, Teheran 11365-IRAN, dez k kun fraŭlino.
Bangalora Esperanto-Centro, o/o s.s.Pradhan, 97, 24th cross, III.Block East, Jayanagar, Bangalore, 560011 India – nova E-grupo dez k.
Malajzia Esperanto-Asocio, sekretariino f-ino Siva Devi, 42, Lorong Kampong Pandan, 55100 Kuala Lumpur, Malaysia – serĉas korespondantojn por siaj klubanoj.
Singapora Esperanto-Asocio, prezidantino f-ino Lee Kim Kiew, 11, Jalan Batu, 04-152, Singapor 1543 – nova klubo serĉas korespondantojn.
Esperantista grupo de Porto Moresbio, c/o John Shadlow, Geography Departement, University of PNC, Box 320, University, N.C.D., Papua Guinea deziras trovi korespondantojn por siaj anoj.
Esperantista Klubo de Bangkok, c/o Pho Thamkhajadpaikun, 42, Areesamphan 5, Rama 6 Rd, Phyathai, Bankok 10400, Thailand, dez kontakti
Liu JIANGUO, Fuyang-Shi Fan Xue Yuan, Jiso Wu Cu, ANHUI, juna instruisto d kor pri ĉiuj temoj.
Boualem Trari, TRARI, BP, 29, Ghriss, W/Mascase, Algerio 32j flegisto, ĉt.
Andreas Kleemann, Im Kirchspitzen 12a, D-7552 – Junulara Koresponda servo Germanio, peras adresojn de korespondemuloj.
KOLODZIEJ Alexandr, Bobrowa 99, PL-39-203 NAGOSZYN, 29j, laboristo ĉt
LITNER Wladyslaw, ul.Odrowonzow 83/15, PL-44-103 Gliwice, 36j laboristo, pri turismo, kol bk.
Esperanto-Rondo, Gimnazio, MEMETH Laszlo, Budapest, Kilian u.15-17, H-1131, Hungario, petas sendi salutleterojn.
Prof.Joao de Maura, Fé, Rua Magalhaes Filho, 2473 Norte Aeroporto, CEP-64030 Teresina-Plani Brasil, pri ĉt, kol bk, 45 jj.
Michail Trifol, 45j prof.de rumana lingvo en gimnazio, R-4038 Bixad Olt, Covasna, Rumanio petas pri E-gazetoj, literaturo.
Laura Krafft, 23jj, Str.Victorei 46/5, R-4150 Odorheiu-Secuiesc, Jud.Harghita, Rumanio, d kor pri literaturo, arto, turismo kaj teatro.
Wang Jiang, P.O.
Shirin Ahmad-Nia, studentino, Kh.Zafar, Kh.Khojand, K.Dolatshad, K.iraj, 33, TEHERAN 19-166, internacia korespondado.

xmxmxmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmx
xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště
ČSFR